DANKON .

Mi dankas vin, Sinjoro,
pro tiuj verdherbejoj,
pro tiu lazura ĉielo,
pro tiu suna oro
kiu min inundis kaj varmigis.

Mi dankas vin, Sinjoro,
pro tiu ĉi montaro
kiun aùtuno vestas
rustkolore kaj flave,
pro tiu streko svaga,
festonita, tie supre,
vualita ĉe horizonto,
pro la spiro profunda
kiu larĝigis mian bruston.

Mi dankas vin, Sinjoro,
pro amo kaj doloro,
pro ekstazo kaj elreviĝo,
pro la soleco
kaj pro homaj kontaktoj,
pro la sekva plenĝojo
de tiu ĉi mia sentemo,
pro senlumaj momentoj
de la senkuraĝigo.

Pro tio kaj io alia,
kion mi plibone ne kapablas diri,
mi dankas vin, Sinjoro !

Anna Amorelli Gennaro

Esperantigis: **Norma Covelli Cescotti**